

## **Zoom-kunveno 16a de decembro, 20.00 UTC.**

Partoprenis: Ivan Colling, Renato Corsetti, Katalin Kovats, Vicente Manzano Arrondo, Radojica Petroviĉ, Fernando Pita, Angela Tellier.

### **1. Listoj de universitatoj kaj Edukado.net**

> La formularo por la universitataj paĝoj de Edukado.net estas preskaŭ preta. KK sendos ligan al la grupo. Ĉiu bonvolu testi la formularon / ĝin rigardi kaj fari komentojn. KK prilaboros la formularon kaj ĝi viviĝos iam inter nun kaj la mezo de januaro. KK infomos.

> KK proponis, ke oni ne plu dsivastigu informojn se la koncernaj informantoj ne estas jam registritaj en Edukado.net, aŭ aliloke.

Renato certigas ke ni faros ĉiun eblan klopodon konvinki niajn kontaktojn en universitatoj registri siajn kursojn.

### **(2) Starigo de kursoj**

> Radojica informos la Estraron de ILEI (espereble kunvenos rete en januaro) por pridiskuti kiel stimuli la starigon de kursoj ĝenerale, ĉu lernejoj, ĉu universitataj.

> KK konsideras la kutimajn alvokojn tro abstraktaj – io pli konkreta bezonatas. Ŝi proponis filmi homojn, kiuj antaŭnelonge starigis kurson; mallonga filmo (5-10 minutoj). KK pretas skajpi, filmi / redakti la intervujojn. Ili estus reklamiloj. RC pretas trovi intervujontojn, sed bv. ĉiuj proponu nomojn.

### **(3) Universitatnivela lernolibro**

> RC rigardis al la libro de Wim Jansen, trovis ĝin klasika, tre valora, kaj ni diskutis ĉu traduki ĝin; bezonatos aldonaj sekcioj - eble - pri novaj planlingvoj por filmoj.

> KK: La nova libro de Vera Barandovska (*Interlingvistiko - Enkonduko en la sciencon pri planlingvoj*) estas preskaŭ preta;

> FP: Vera donis al li permeson portugali la libron kaj eldoni ĝin ĉe sia universitato. Oni bezonas tiujn sciencnivelaĵajn dokumentojn por konvinki universitatajn kolegojn pri la valoro de Esperanto.

### **(4) Raportetoj pri la diversaj projektoj**

> VM: La dua kurso rilate Afrikon plene sukcesis, tamen daŭras kelkaj problemoj flanke de la universitato. Ĝus malfermiĝis alia alvoko; VM faros peton. Li informos pri progreso.

> Open Journal Systems: VM havas studenton kiu interesiĝas pro neceso fari tiurilatan projekton; momente ni lasu aranĝojn ĉe tiu studento, kaj ĉe VM

> Intervuoj: mankas ĉe VM tempo daŭrigi laŭ la ĝisnuna ritmo (analizo de la intervujoj bezonas tro da tempo); VM proponas daŭrigi, sed laŭ modifita sistemo. Ni konsentis. La konkludoj venu ĉe la fino de la intervujoj.

> Agnosko de Esperanto kiel lingvo ĉe la Universitato de Sevilo. VM jam kontaktis pri agnosko, oni rifuzis; VM faris tiurilatan intervujon; sendis ligan:

<https://www.lavanguardia.com/ocio/viajes/20191215/472242178617/el-esperanto-una-realidad-cultural-existente-en-sevilla.html> kaj en la angla:

<https://www.en24.news/2019/12/esperanto-an-existing-cultural-reality-in-seville.html>.

> Diskuto pri starigo de kursoj en du kategorioj (a) prilingva (b) pri kulturo / komunumo ktp. Oni diskutos januare en Poznan. RC ĉeestos, ankaŭ (eble) VM. VM jam sendis al Ilona kaj KK malnetajn leteroj pri tiu temo; li ĝisdatigos ilin kaj rondirigos ilin por ni prikomenti.

> Projekto pri Amo - ni moment lasu surtable.

### **(5) Konferencoj kaj kongresoj**

> RP sendis ligan ([http://ftn.kg.ac.rs/konferencije/lvc2019/BookofAbstractsLVC\\_final.pdf](http://ftn.kg.ac.rs/konferencije/lvc2019/BookofAbstractsLVC_final.pdf)) al la jam publikigita trilingva (angla, serba, Esperanto) libro de resumoj de la ĉi-jara konferenco pri *Edukado en virtualaj komunumoj* okazinta en kadre de la kongreso de ILEI organizite de la Fakultato de Teknikaj Sciencoj en Ĉaĉak, Univerzitato de Kragujevac, kunlabore kun ILEI. Ni disvasitgu pri ĝi informojn. La universitato solvis ĉiujn administrajn aferojn kun la koncerna ministerio, Nacia Biblioteko de Serbio, havigis ISBN kaj publikigis la libron elektronike.

> RP ne plu okupiĝas pri organizado de kongresoj en ĉefa rolo. FP pretas engaĝiĝi por la ILEI-kongresa simpozio. RP proponos al FP, Mirejo, IC, kaj eventuale ankaŭ Suzano Roy prian retkunvenon.

> FP kaj IC raportis pri sukcesa kongreso, kun ok tre interesaj temoj; oni espu ke aperos pri ĝi libro. [en kiu lingvo?]

> Datoj kaj lokoj de la aranĝoj en Kanado, 2020:

- ILEI-Kongreso – Kekbekurbo, 25 julio – 1 aŭgusto 2020, kun planata, ankoraŭ ne certa simpozio pri *Interlingvistiko en universitatoj* la 1-an de aŭgusto.
- UK – Montrealo, 1-8 aŭgusto 2020
- Kurso pri Esperanto – Montrelao, ĵaŭdo – vendredo, 6-7 aŭgusto 2020 (Katalin kaj Sylvain)
- Nitobe-simpozio – verŝajne en Montrealo tuj post la UK, ekde la 8-a de aŭgusto posttagmeze.

### **(6) Venonta kun-Zumado**

> AT preparos dudlon – ni celu la mezon de februaro